

## Invite al *Kampo de Literaturo*

Ekde la unua de aprilo de 2017 la E-redakcio de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) havos sian lokon ekskluzive por la nova literatura rubriko *Kampo de Literaturo* (KL).

Estas bonvenaj ĉiuj esperantistaj verkemuloj kaj tradukamantoj. Se vi havas iun ajn manuskripton, legindan por la publiko, dividendan por aliaj, do ne hezitu sendi ĝin al la skipo de KL. En KL estas diversaj branĉoj por originalo kaj traduko: poemo, novelo, fabelo, rakonto, eseo, recenzo (por rekomendi bonan libron literaturan aŭ dividi vian penson pri ĝi). KL uzas litergrandon 14 en la teksto de la kontribuaĵo kaj litergrandon 16 en la titolo; la litertipo estas Times New Roman. La partoprenaĵo, prefere, ne estu tro longa. Vian kontribuaĵon kiel aldonan dosieron en la formato .doc de Word, kun unikodaj supersignoj, bv. sendi al [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn) kaj samtempe al [xionglinpingesp@163.com](mailto:xionglinpingesp@163.com). Pri ĉia problemoj vi turnu vin al tiuj du retpoŝtaj adresoj.

Bv. indiki ĉe komence de via teksto, al kiu branĉo ĝi apartenas; kaj ĉe fine vian personan informon pri la nomo, sekso, aĝo, nacio kaj persona foto (kompreneble, se vi konsentas ĝin montri ĉe via aperigaĵo).

Reguloj de premieto: Ekde aprilo de 2017 en ĉiu tria monato KL havos tri plej elstarajn kontribuantojn, kiujn KL premias per po unu ĉina libro esperantigita aŭ io alia, pli malpli valora. Ĉiuj premiitoj, kiel furoruloj, sidas en la rangolisto trimestra. Tiuj premiitoj naskiĝas tiamaniere: la sistemo de la retejo aŭtomate aperigas ses plej ofte legitajn aŭtorojn, inter kiuj KL ellotas tri. Tiuj tri do estas premiitoj. Nur tiuj homoj, kiuj ne gajnis la premion dum la ses tuj antaŭaj monatoj, rajtas partopreni en la premio. Ne eblas jura traktado al la rezulto de la aljuĝo. Kaj KL havas specialan premion, kiu nomiĝas *Bravulo*. Iu ajn, se li/ŝi kontribuas almenaŭ unu manuskripton aperigitan en ĉiu monato dum la tuta jaro, aŭtomate ricevas la premion *Bravulo*. Al li/ŝi KL donacas ankaŭ ĉinan libron esperantigitan aŭ ion alian. Kaj cetere, tiuj “bravuloj” eniras en nian honorejon.

Oni regule disaŭdigas en radio bonajn elektitajn el la kontribuaĵoj.

Aparte oni devas atenti: La kopirajt-demandon la KL-skipo ne traktas. Do ĉiuj verkoj devas esti originalaj, kaj ĉiuj tradukoj devas ne havi demandon pri kopirajto.

La partoprenanto havas kopirajton pri sia kontribuaĵo, sed li/ŝi konsentas senkondiĉe cedi ĝin al la KL-skipo, kiu havas rajton eventuale publikigi

lian/ŝian verkon aŭ tradukon libroforme aŭ/kaj en iu alia formo – kompreneble ne por komerca celo.

Kaj laste, ankaŭ necese, la skipo de KL petas, ke vi kopiu la ĉi-subajn vortojn ĉe ĉiu via sendaĵo: Mi mem konsentas senkondiĉe cedi mian manuskripton al la skipo de *Kampo de Literaturo* por ĝia uzado, kun celo de bono, sed ne de komerco.

Sukceson kaj progreson al vi en *Kampo de Literaturo*!

La skipo de *Kampo de Literaturo* en la E-redakcio de ĈRI

Retadreso:

[espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

[xionglinpingesp@163.com](mailto:xionglinpingesp@163.com)

(Ĉiam notu: vi nepre sendu samtempe al tiuj ĉi du retadresoj.)

2017-02-15